# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:22; junio 1.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo kultura div (UN) + rusio xx KB. Sume xxx KB

## AMO-seminario en Aruŝa konfirmita

Post multaj klopodoj, ni anoncas la okazigon de AMO-seminario en Aruŝo, Tanzanio, komence de aŭgusto kadre de la Universala Kongreso. La temo estos la evoluigo de la movado en Afriko. Subtemo povas esti *Teama laborado.* Adjevi Adje estas en diskuto kun fortoj en Tanzanio pri la konkreta dato kaj aliaj programeroj.

## AMO-seminario 110 en Pollando

Jen la enkonduka saluto de SMG pri la programo Erasmus+

“Pluraj esperantistoj eluzis la subvencieblojn de la eŭropa programo Erasmus+. Tio ebligis plurajn utilajn agadojn, kiuj sen tiu subvencio ne povintus okazi. Grava celo de ĉi tiu AMO-seminario 110 devas esti la pli vasta konigo de la ebloj de tiu programo por allasi pli ampleksajn kaj utilajn agadojn. La aliro al Erasmus bezonas klaran kaj zorgan preparadon, por kiu en la movado ja estas spertuloj.

Ni bondeziras al ĉi tiu AMO-seminario, kaj volonte ricevos raporton pri la rezultoj”

SMG, majo 27, 2024

## La Unesko-kuriero pri artefarita inteligento




*Edukado en la epoko de artefarita intelekto* estas la ĉefa temo de la lasta pasintjara numero de *Unesko-Kuriero*, senpage elŝutebla en la retejo de Unesko. Legu pli en la novaĵretejo de *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/05/unesko-36/

La numero estas elŝutebla pere de la retejo de UEA.

## Pliaj meditoj pri artefarita inteligento

“Zamenhof laboris por la paco en sia tempo. Ni daŭrigu lian laboron nun, kiam la mondo estas sama kiel tiam kaj homoj atakas aliajn homojn ŝakale, ne plu per glavoj, sed per flug-robotoj gvidataj de Artefarita Inteligento sed same sangon soifantaj”, – legu en *La Ondo de Esperanto* artikolon de Renato Corsetti pri la prepariĝo al la Esperanto-tago, la 26-a de julio 2024 —https://sezonoj.ru/2024/05/esperanto-tago-3/

## Studado pri lingvaj rajtoj en seminario de UN

La Studgrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj prezentas virtualan seminarion kun la temo: *Lingvaj Rajtoj por Paco, Justeco kaj Fortaj Institucioj* okazonta en la 10-a kaj 11-a de junio ekde 12:30 UTC.

Plurlingveco estas kerna valoro de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen ĝi malofte estas traktita rilate al la celoj kaj indikiloj de la Celoj por Daŭripova Evoluo. Lastatempaj mejloŝtonoj atentigas pri la graveco de plurlingveco kaj lingvaj rajtoj. La 30-a datreveno de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj estis festita en 2022. La lanĉo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj ankaŭ en 2022 alportis renoviĝintan atenton al la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. (UNDRIP). Krome, la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj estis festita en 2023. Ĉiu el tiuj iloj, inter aliaj (ekz., la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj [ICCPR]) havas komunan atenton al lingvaj rajtoj, inkluzive de nediskriminacio koncerne lingvon. La Deklaracio pri Minoritatoj, UNDRIP, kaj ICCPR, siavice, diverse protektas la rajtojn al lingvo en kuntekstoj kiel ekzemple edukado, amaskomunikilaro, kaj juro same kiel la rajton partopreni en ĉiuj kampoj de la socio, inkluzive de decidado kaj politikaj procezoj. Ĉi tiu dutaga virtuala simpozio atentigas pri la esenca rolo, kiun multlingvismo devas ludi en iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj, membro-ŝtatoj, neregistaraj organizaĵoj, la privata sektoro kaj aliaj koncernatoj por kreskigi pacon, justecon kaj fortajn instituciojn. Lingvo peras ĉian homan sperton. Plene inkluziva dialogo, problemsolvado kaj justeco devas engaĝi signifan uzon de multlingvismo por certigi, ke homoj povas kompreni unu la alian, aliri informojn juste kaj partopreni demokratie. Plurlingveco estas fundamenta por pacaj solvoj kaj fortaj institucioj. Krome, ĉiuj iniciatoj devas eksplicite enkalkuli lingvajn minoritatojn por ke 'neniu restu malantaŭe' pro sia lingva fono. La simpozio sekvas panelformaton per kiu fakuloj prezentas siajn perspektivojn, engaĝiĝas en dialogo kun unu la alian, kaj instigas al ĝenerala diskuto kun partoprenantoj.

## Fervojoj kaj globa varmigo

Ĉi tie en ResearchGate vidu mian novan kontribuon – artikolon pri la kalkulado de emisioj de transporto, preparita en kunlaboro kun mia iama studento – la plej juna membro de ĈeFEA (Ĉeĥa fervojista Esperanto asocio r.a. ČŽES-Český železničářský esperantský svaz z.s. Landa asocio de IFEF Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (wz.cz).

ılav Matuška, Ph.D. Universtato de Pardubice




## Tago de kultura diverseco

Kulturaj valoroj gravas por socia interkonsento, edukado kaj bonfarto. Per tiaj valoroj ni donas koheron al la vivo kaj spertas la mondon. Kunlabore kun Unesko, en la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo, ni rimarkigas la riĉecon de kulturoj ĉirkaŭ la mondo kaj la esenca rolo de interkultura dialogo por atingi pacon kaj daŭripovan evoluigon. […]

Lingvoj okupas gravan kaj specialan lokon, kiam oni parolas pri kultura diverseco kaj dialogo. Lingvoj estas, samtempe, kulturaj esprimiloj kaj portantoj de kulturoj. Pro tio, la Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco asertas, ke “ĉiuj personoj havas la rajton esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en sia propra gepatra lingvo”.

Ni alkroĉas la plenan tekston de la deklaro de UEA.

## Studentoj vizitis la muzeon kaj bibliotekon de Zaozhuang



Ĵus okazis la Unesko-tago de muzeoj. Mezlernejanoj kaj superaj mezlernejanoj vizitis la Esperanto-Muzeon en Zaozhuang, kune kun studentoj kaj eksterlandaj studentoj de Zaozhuang-Universitato. La mezlernejanoj multe amuziĝis traserĉante la Esperantajn librojn, kiuj nun estas en malfermitaj bretaroj.

Alessandra Madella

## Verduloj en facila prezento

https://uea.facila.org/artikoloj/movado/asocio-de-verduloj-esperantistaj-r424/

https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/%C4%89apelo-r429/

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/e%C5%ADro-a%C4%9Das-25-jarojn-r428/

## Hungaroj festas kune en la okcidento de la lando

La 25-an de majo, membro de nia grupo en Győr, nia kara Iván Varga denove aranĝis la majan Renkontiĝon en Bodonhely, jam la 26-an fojon. Ni gratulas lin pro ĉi tiu impona serio kaj la multaj agrablaj horoj, pasigitaj tie! Li kore atendis gastojn.

Jozefo Horvath, vortaro.hu

## Universitatanoj kunpensas kaj kunpensigas

La registraĵo de la Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj nun spekteblas en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=ku-WucJZQqk.

Tie estas Ludlisto por ĉiuj sesioj de la Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj: https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

## Seminario kun Esperanto kiel laborlingvo

Ekde la 16-a de oktobro 2024 en Moskvo okazos dutaga Internacia Simpozio kun la temo «Problemoj de parola patologio», unu el la laboraj lingvoj estas Esperanto. La formato estas miksita — ĉeesta kaj distanca. La koncernaj specialistoj el Rusio kaj eksterlando estas invitataj. Ni alkroĉas la du-paĝan priskribon por la kunveno.

Александр Лебедев = Aleksandr Lebedjev, se mia cirilaj kapabloj adekvatas.

## Librokolekto sekurigita en Israelo

La estraro de la israela landa asocio (ELI) aŭdis pri plano trovi hejmon por la libraro de ELI en la publika biblioteko de la norda urbo Hadera, kiu interesiĝas akcepti kaj eĉ katalogi kaj eksponi la librojn. Se tio realiĝos, estos perfekta solvo por tiu amaso de valoraj libroj, kiu akumuliĝis dank' al la heredaĵoj de pluraj forpasintaj samideanoj.

Amri Wandel

## Nederlando kaj Italio kulture kune

En la 16-a de majo en la itala Instituto de Kulturo en Amsterdamo okazis aparte grava kunveno kun alparoloj de kvar profesoroj laŭ la teno ;Esperanto inter Italio kaj Nederlando, en la ĉeesto de la itala ambasadoro Giorgio Novello. La grupo Kajto suplementis la programon per Esperanto-kantoj.

**La teksto tradukita al Eo el la mizera malkapablo de SMG memori siajn iamajn konojn de la nederlanda.**

## Nia hispana asocio mesaĝas antaŭ la eŭropaj balotoj

Antaŭ la proksimiĝo de la baloto al la Europa Parlamento indas demandi sin, kia estas la lingva politiko de Eŭropa Unio kaj kien iras la eŭropaj institucioj rilate la protekton de kultura kaj lingva diverseco, la kohero inter la landoj kaj la respekto al la minoritatoj. Malgraŭ la teoriaj kaj instituciaj engaĝiĝoj al diverseco en la praktiko la Eŭropaj institucioj privilegias en sia ĉiutaga agado unu lingvon, la anglan, kiu fariĝis *de facto* la laborlingvo, kvankam post la eliro de Britio neniu lando proponis ĝin kiel prioritatan, kaj ĝi estas nur kuna oficiala lingvo de du ŝtatoj kun aliaj naciaj lingvoj. Nur la inerteco kaj la fakto, ke ĝi estas la lingvo de alia superpotenco, kreis tiun privilegian situacion.

Nia asocio, Hispana Esperanto-Federacio, membro de EEU kaj UEA, konsideras, ke ekzistas aliaj solvoj. Unu el ili estas la progresiva uzo de neŭtrala lingvo, kiu ebligas internacian komunikadon kaj ne metas iun ajn en avantaĝan situacion. Esperanto pruvis dum pli ol kvin generacioj de parolantoj, ke ĝi provizas egalecan komunikadon inter personoj de malsamaj landoj kaj ke pro sia relativa facileco ĝi estas pli efika komunikilo. Esperanto apartenas al neniu ekskluzive kaj povas aparteni al ĉiuj, tiel ke ĝi povas kontribui al pli multlingva, pli justa kaj pli efika Eŭropo.

========= vortoj: 1355 =========

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.

Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Komunikoj 1-20 legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigoj, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.